GRUPO ESPERANTISTA
# "FIDO KAJ ESPERO"
VALLADOLID

NEUTRALA

MAYO-JUNIO; JULIO-AGOSTO Núms. 140-141
DIRECCION POSTAL: Apartado, 119, 47080 VALLADOLID

GRUPO ESPERANTO VALENCIA
BIBLIOTEKO

---

A la vuelta de las vacaciones veraniegas, que esperamos hayan sido lo más agradables posible, creemos que es conveniente comunicarnos de nuevo e ir pensando en alguna actividad para el nuevo curso, si bien siempre estaremos limitados por la carencia de un local donde poder reunirnos con asiduidad.

Varios de nuestros socios han participado en Congresos tanto internacionales como nacionales, y así Luis Martín Herrero asistió con su esposa al 42 Congreso Internacional de Esperantistas Ferroviarios celebrado del 2 al 8 de Junio en la ciudad noruega de HAMAR; mientras que otro grupo participó en el Congreso Nacional de Esperanto celebrado en Sant Cugat del Vallés (Barcelona).

En este número de BOLETIN se publica un amplio reportaje sobre el Congreso Nacional y mucho nos gustaría que los que habeis participado en otros congresos o reuniones esperantistas nos enviarais un artículo, escrito en Esperanto o en español, contandonos vuestras impresiones y vuestras experiencias.

Quisieremos que este año se hiciera factible el deseo de reunirnos, por lo menos una vez al mes, para cambiar impresiones y si fuera posible, intentar realizar alguna actividad, para ello vamos a reunirnos de nuevo en la Cafeteria del Hotel Mozart, los primeros jueves de cada mes, de 7 a 9 de la tarde.

Como en años anteriores tenemos prevista la adquisición de Loteria para el Sorteo de Navidad. En el próximo número que, procuraremos, publicar en breve se informará amplia y detalladamente sobre el particular.

ESPERANTO

# 50a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Sant Cugat del Vallès (Katalunio)
de la 11a ĝis 16a de Julio 1990

En la Centro Borja de S. Cugat del Vallés, en tre agrabla ĉirkaŭaĵo kaj etoso, kun ĉeesto de preskaŭ tricent kongresanoj okazis la 50-a - HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO.

Tiu ĉi Jubilea Kongreso, la unua prezidata de la nova HEF-Prezidanto, S-ro Alonso Núñez, estis plena de aktivaĵoj kaj la kongresano, plurfoje, estis devigata elekti inter diversaj programeroj samtempe okazantaj.

La plej granda parto de la kongresanaro loĝis, manĝis kaj kongresis en la Centro mem, kio faciligis la kontakton inter la HEF-Estraro kaj la aktivuloj. De nia Grupo "Fido kaj Espero" partoprenis kvin membroj, kaj du el ili devis zorgi la kongresan Libroservon, kiu estis tre varia kaj riĉoenhava. Notinde estas ke la regiona T.V.E. filmis ĉion detale , kaj diskonigis ĝin per unu el la regionaj programoj.

La 12-an de julio okazis la solena inaŭguro kun ĉeesto de la urbestro de S. Cugat kiu prezidis la aranĝon, kaj prelego de la Prezidanto de HEF kiu prezentis per entuziasmaj vortoj, la perspektivojn kaj agadplanon de la laboro de H.E.F. Sekvis paroladeto de la Prezidantino de L.K.K. S-ino Trini García, kaj de la urbestro de S. Cugat, kiu malfermis la Kongreson. Sekve, salutis la reprezentantoj de Grupoj kaj Sekcioj.

Du ekskursojn ni partoprenis: Duontagan al SABADELL kie ni vizitis tre interesan Muzeon pri Paleontologio, kaj la modernan monumenton al D-ro Zamenhof, kie oni metis belan florbukedon. La alian tuttagan al la fama Monaĥejo POBLET, kiu gardas riĉecojn kaj havas grandan rilaton kun la historio mem de Katalunio, kaj kies klostron kaj preĝejon ni detale vizitis. Samtage, kaj post la tagmanĝo, ni vizitis la HISPANAN MUZEON DE ESPERANTO en S. Pau d´Ordal kie ni estis afable kaj ĝentile regalitaj de Gesinjoroj Hernández Yzal kaj kie multaj gekongresanoj avide - trarigardis la diversajn kolektojn tie ekzistantaj.

Diversaj prelegoj okazis kaj ni partoprenis en prelego de S-ro Gilpérez pri "Speleologio ", klarigita kun la helpo de lumbildoj, kaj ankaŭ en tiu de Miguel Fernández pri García Lorca, kvankam pro nia devo zorgi pri Libroservo ni ne povis esti dum la tuta prelego, ni vere ĝuis ĝin. Vere, la Hispana Esperanto-movado povas esti fiera havi inter siaj membroj tiel valora kaj altkvalita persono.

Kortuŝa evento estis la omaĝo al la elstaraj katalunaj samideanoj, jam forpasintaj, ĉefe al S-ro Petro Nuez kaj al S-ro Ramón Fernández Jurado, kies meritoj, per interesa parolado elstaris S-ro Giordano Moya. En ĉi tiu aranĝo ĉeestis la prezidantoj de ĉiu esperantaj asocioj ekzistantaj en Katalunio.

Resume, tre brila kongreso, kun multaj aktivaĵoj, tiel kulturaj kiel amuzaj, kiu certe kontentigis la plej grandan parton de la kongresanaro , kiuj agnoskis la grandan laboron tiel de L.K.K. kiel de la estraro de H.E.F., kaj instigas nin partopreni en venontaj kongresoj, sed... kie en 1.991?.

# "POEZIO"

## INFANVARTEJO

Infanvartejon ĉeesti
mi ne volas, kara patro,
ĉar troviĝas tie aro
da knabetoj kaj virin'

Ili kriadas senpaŭze
kiel aĉaj virinetoj
kaj sur mian kajereton
neniom eblas al mi.

Kaj krom tia malfeliĉo
mi sentas min en soleco,
ĉar la virina beleco
ne rigardas nur al mi.

Pri ĉio ŝi stare atentas,
ĉienflanken rigardante
al la kreto mantenante
ŝi preteratentas min.

Mi volus esti la sola
kiu estus ĉe la lernejo
kaj tiel infanvartejo
estus vartejo por mi.

Pro tio plej kara patro
pro tio kara patrino,
al la vartej'de l'virino
ĉeesti ne ŝatas al mi.

---------

## ESLA DIG-LAGO

Ĉe la diglago
sur eta ŝtono
fiŝkaptas mi;
fiŝhokon kaŝas
logaĵo freŝa...
vera kaptil'!

Ora fiŝeto
sub ondo blua
rigardas ĝin
fulmorapide
por la fiŝeto
estos la fin'!.

-----------

## LASTA POEMO

Mi tiel forte revis pri vi
mi tiel parolis kaj marŝis
tiel mi amis vian ombron,
ke ne restas al mi plu de vi.

Restas al mi esti ombro inter ombroj
esti centfoje pli ombro ke la ombro
esti l'ombro kiu venos kaj revenos
en vian sunigitan vivon.

(Robert Desnos 1900-1945)

## ORAJ FLAGOJ DE SAN ESTEBAN

Kirketo de San Esteban,
tiel sola ĉe rokaro,
vi gardas la flagojn orajn
depost eble ol miljaroj.

Viadorse "Pilomoro"
elrokfluanta fontano,
fronte al vi la roma ponto
apude de reĝa padó.

Inter la fonto kaj ponto
kaj apuda reĝa pado,
vi gardas el pure oro
la tri oldajn flavajn flagojn

Langformaj nigraj nuboj
kovras ĉielon;
tra la krutaĵoj de l'Kristo
blovas vento.

Superteraj stalaj vojoj
aeron rompas;
preĝej'silente rigardas
valon kaj solas.

Rokermurego disiĝa
depost jarcentoj;
funebraj steloj disaj,
oldaj muelejoj.

Furion sian, Eolo,
super diglagon
forĵetas kaj okazigas
gigantan langojn!.

L. Pelayo

# 3-a ASTURA ESPERANTO-KONGRESO
## Gijón 12-14 Oktobro 1990



Dum la semajnfino okazos en GIJON la 3-a Astura Kongreso de Esperanto, kun tre varia kaj interesa programo, inter kiu ni mencios la prelegojn hispane kaj esperante; la folkloran prezentadon kaj la turisman promenadon tra la urbo. La kapableco de niaj asturaj samideanoj certigas agrablan -kaj sukcesan kongreson. Kaptu la okazon kaj partoprenu en ĉi tiu esperantista aranĝo.

**PERIODICO**

SEVILLA, SEDE DE LA EXPOSICION UNIVERSAL 1992

VALLADOLID 4 OCT 90

Grupo de Esperanto
G.V. Fernando el Católico, 45
46008 VALENCIA

Grupo Esperantista
Apartado 119
47080 VALLADOLID